



ESPERO KATOLIKA



KARAJ LEGANTOJ!

La tempo de la ĵerioj pasis kaj komenciĝis la longaj vesperoj, kiuj donas la okazon por seriozaj studoj, klubvesperoj kaj kursoj. Feliĉe nia movado estas jam grandskale konata kaj tial estas pli ĉ facile varbi novajn adeptojn. Tamen, niaj klopodoj restas ĉiam necesaj por konvinki niajn konatojn ne nur pri la utilo de Esperanto, sed ankaŭ pri la fakto, ke oni certigas al si ion vere altvaloran por la tuta vivo per relative malmulte da cerbostreĉo. Neniam troigu parolante pri la „ĉ facileco“ de Esperanto, ĉar tio poste nepre kaŭzos seniluziigojn ĉe homoj, kiuj ne estas scienculoj, lingvistoj ktp. Sed parolu pri la praktika utilo precipe en internaciaj rondoj kaj pri la, kompare kun la studo de aliaj lingvoj, relative mallonga tempo kiun postulas la ellerno de Esperanto.

En speciala artikolo vi povas legi pri niaj planoj, eldoni la Evangeliojn en kajeroj kiel aldonoj al Espero Katolika. Ni ne volas devigi niajn legantojn, sed esperas ke la sumeton de unu ned. guldeno = 4 steloj en tuta jaro por 48 paĝoj ĉiuj povas kaj volas pagi. La pago estas libervola; ni nepre ne volas plialtigi la kotizon, sed ĉiuj certe komprenos, ke ni absolute ne povos ĉari la grandan elspezon de tiuj ekstraj paĝoj se ne la plimulto el niaj membroj pagas tiun aldonan sumeton: por vi malgranda, sed por ni nepre necesa por povi efektiviĝi tiun planon.

Cetere vi jam scias, ke la ordinaraĵoj de presado, aĉranko ktp. apenaŭ estas kovritaj se ĉiuj membroj vere pagas sian kotizon; tial ni volonte akceptos subtenan alpagon de personoj kiuj estas konvinkitaj, ke E.K. estas ĉakte tro malmultekosta en komparo kun aliaj gazetoj.

Membroj, kiuj disponas pri suĉiĉe da monrimedoj, povas eĉike helpi nian unuigojn, ĉariĝante Dumviva Membro, por kio oni pagos unufoje 20x la jarkotizon. La listeto jam ekkreskas: ĝi estu inda listo en la jarlibro 1961!

Jam nun mi petas ĉiujn, kiuj volas plenumi la ĉfunkcion de konsulo de I.K.U.E., kaj kiuj ankoraŭ ne estas menciitaj kiel tiaj en la jarlibreto 1960, ensendi nomon, adreson, profesion ktp. kaj mi esperas ke pli multe da kluboj anoncos sin, por ke la listoj en la jarlibro 1961 estu pli longaj ol tiuj de la nuna jaro. La sekvanta jarlibreto jam estos pli dika ol la nunjara, kio kaŭzos duoblan aĉrankon, sed la libervolaj donacoj certe kompensos tion. Kaj ne ĉorgesu, ke la varbado de novaj membroj estas la plej eĉika maniero por plifortigi la ĉfinancan bazon de nia unuigo kaj certigi la regulan aperon de ampleksa Espero Katolika.

Tre urĝa peto al ĉiuj: pagu jam nun la kotizon por 1961 por efektive helpi vian propran unuigon kaj por igi malpli pezaj la zorgojn de la kasistino de IKUE.

Tre koran antaŭdankon al ĉiuj bonvolemaj helpantoj!

Truus Durenkamp

NONCIATURE APOSTOLIQUE
EN BELGIQUE

Bruxelles, le 10 août 1960

No. 6590

Monsieur le Président,

La Secrétairerie d'Etat de Sa Sainteté me charge de vous adresser les remerciements du Saint Père pour l'hommage que, par votre intermédiaire, les membres de l'Union Catholique Internationale Espérantiste, réunis au Congrès Eucharistique de Munich, ont bien voulu lui présenter.

En m'acquittant de cette tâche, je vous prie, Monsieur le Président, d'agréer l'assurance de ma considération distinguée.

+ Eŕrem Forni
Arch. Nonce Apostolique

Monsieur l'abbé BECKERS
Président de l'I.K.U.E.
Révérend Curé de
KWAADMECHELEN.

laŭ Esperanta traduko:

Sinjoro Prezidanto,

La Ŝtata Sekretariejo de Lia Sankteco al mi komisiis sendi al vi la dank-esprimojn de la Sankta Patro pro la honoro, kiun, per via perado, la membroj de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, unuiĝintaj je la Eŭkaristia Kongreso en Munkeno, al Li bonvolis oferi.

Plenumante ĉi tiun taskon, mi petas al vi, Sinjoro Prezidanto, akcepti la certigon de mia speciala estimo.

+



FRANCUJO. En 1950 poldevena invalida fraŭlino, *Suzana Wrotnowska*, fondis en *Brou* apud *Parizo* kongregacion de religiulinoj, speciale por invalidaj kaj malsanaj knabinoj. La kongregacio nun havas 220 religiulinojn, inter kiuj multaj blindulinoj, surdmutulinoj ktp. kiuj okupas sin pri taskoj, adaptitaj al ĉies eblecoj. En Francujo nun estas 5 tiaj monahinejoj, en Usono kaj Anglujo po unu. En 1961 oni fondos filion en Nederlando. *

HONGKONG. La nombro de la katolikoj ĉiam kreskadas. Multaj plenkreskuloj akceptas nian religion; je Pasko pasinta 2000 personoj

estis baptataj kaj la episkopo confirmis 700 novajn kristanojn.

GVINEO. La nova afrika ŝtato havas 2.508.000 loĝantojn, inter kiuj 25.000 katolikoj kaj 6.500 kateĥizatoj. Ekzistas ĉefdiocezo, prefektujo kaj diocezo, en kiuj entute laboras 93 sacerdotoj, inter kiuj 6 gvineanoj; 14 religiataj fratoj, 94 religiulinoj kaj 208 kateĥizistoj. Kvar teologi-studentoj preparas sin al la sankta Ordino. En 1949 tie estis 19.264 katolikoj kaj 2 enlandaj sacerdotoj. *

JAPANUJO. De la 92 milionoj da loĝantoj 266.262 estas katolikoj laŭ statistiko de 30.6.59 (130.900 en 1949) en 15 diocezoj, el kiuj 11 havas japanan episkopon. En 1949 laboris tie 595 sacerdotoj, inter kiuj 181 japanaj; en 1959 tiuj nombroj

→

Je la 13a de oktobro 1917 Maria aperis lastfoje al la infanoj en Fatimo kaj tial ĉiujare ĉi tiu dato estas rimarkinda en la portugala pilgrimejo. Ĉi jare la atento de multaj estos ankoraŭ pli streĉa, ĉar 1960 estas la jaro de Lucia indikita por la publikigo de la tria parto de la komisiono, kiun ŝi ricevis de la sankta Virgulino.

Oni jam skribis pri tio en la gazetaro kaj certe la internacia situacio, kiu estis kaj estas tre malfacila, influis tiun iom sensacian skribadon. Grave estas, ke la episkopo de la pilgrimejo rimarkigis, ke la vera enhavo de la komisiono de Maria jam estas publikigita! Ŝi bonvolis klarigi, ke ni mem havas taskon por gajni la pacon: „Preĝu kaj pentu”, jen la vorto de la Virgulino.



N:ia Sinjorino de Fatimo

Tiel la episkopo instigis kaj invitis por memorigi la 13an de oktobro ĉijare per pentoj kaj preĝado kaj volonte multaj tiel partoprenos al la pli grandaj solenoj en Fatimo. Alia propono de la sama episkopo invitas ĉiujn episkopojn dediĉi siajn diocezojn al la Senmakula Koro de Maria, laŭ la deziro de Maria al Lucia. Speciala soleno okazos en Fatimo je la 13a de oktobro estonta: la malsanuloj estos benataj per la relikvoj de la beata Nuno Alvarez Pereira. Je la 24a de junio pasinta oni memorigis la 600-jaran datrevenon de lia naskiĝdato. Li, la nacia heroo kaj militisto, dum la lastaj ok jaroj vivis kiel frato karmelito!

Pro tiuj kaj aliaj kialoj oni atendas en Fatimo multajn pilgrimantojn, kiuj certe partoprenos la antaŭnoktan procesion per kandeloj lumigitan. Certe ankaŭ ili ĉeestos la Sanktan Horon de meznokte ĝis la unua. Sekvos la adorado de la Tre

Sankta Sakramento de la unua ĝis la sesa kaj post tio la sanktaj Mesoj ĝis la oka. Fine je la deka okazos la pontifika Meso kun prediko, kun beno de la malsanuloj kaj fine la adiaŭo.

Do ĉi tiu 13a de oktobro estos eksterordinara tago kaj la samideanoj, kiuj deziras ĉeesti, ĝustatempe alvenu. Se ili deziras pluajn informojn, ili skribu al la subsigninto, kiu loĝas en la „Casa Beato Nuno, Cova da Iria, Fatimo, Portugalujo.

Fatimo donas la ekzemplon, ke multegaj kune preĝu kaj pentu!

Gabrielo Pausback O.Carm.

kreskis ĝis resp. 1583 kaj 392. En la supera seminario studas 237 estontaj sacerdotoj *

HINDUJO. La supera seminario de S. Jozefo en *Alwaya (Kerala)* nombras 686 studentojn de teologio kaj filozofio; ili apartenas al 3 ritoj: sirio-malabara, sirio-malankara kaj latina, laŭ la diocezoj al kiuj ili apartenas. La konstanta kreskado de la nombro da studentoj necesigis pligrandigon de la seminario. *

LA PROPRA KARAKTERO
de nia katolika Esperanto-movado
kaj ties ekzistorajto
(daŭrigo)

La ekzistorajto de nia propra organizo.

Ĝuste pro tio, ke nia celo estas tiel universala kaj nenion ekskludanta, ni posedas propran organizon, ĉar neniu alia Esperanto-organizo posedas tiel universalan celon!

Krome pro tiu universaleco ni povas konstati, ke tiu celo parte koincidas kun tiu de aliaj Esperanto-organizoj. Se ili ĝenerale disvastigas nian lingvon kaj ties uzadon, ni estas simple iliaj samcelanoj. Pro tio en multaj kazoj nia kunlaborado estas utila kaj unike bona por atingi nian komunan celon.

Sed krome ni posedas en nia celo ion propran, kio troviĝas nur en nia movado. Se mi ĉi supre prave konstatis, ke nia organizo ne estas pure religia organizo kaj ke nia revuo ne estas nur religia revuo, mi ne neis, ke nia organizo tamen estas religia kaj same nia revuo kaj nia agado.

La pure religiaj aplikadoj de la internacia lingvo certe apartenas al nia movado kaj precize estas ĝia koro!

Ĉu iu el vi povas imagi, ke neŭtrala movado povas prizorgi niajn religiajn interesojn?

La internacia katolika vivo estas tiom varia kaj multspece organizita mondo, ke nur katolikoj povas tiun mondon esperantigi. Por tio estas necesa nia IKUE. La apliko de la internacia lingvo sur katolikaj terenoj bezonas daŭran studadon kaj agadon, kiuj nur estas eblaj en la rondoj de IKUE kaj IKI kaj Pax Christi ktp. La evoluo de la religia internacia lingvo postulas kunlaboron de katolikaj fakuloj kaj Esperantistoj, kio estas ebla nur en katolika rondo.

Kvankam do nia movado ne estas pure religia, ĝi jes estas unualoke religia, kaj same nia revuo *Espero Katolika* kaj nia agado.

Jen la ekzistorajto de nia propra organizo!

* *
*

La rilato de nia propra organizo kun la neŭtrala movado.

Ĝuste tiu rilato estas aktuala problemo por niaj katolikaj Esperantistoj, ĉar la Universala Esperanto Asocio (UEA) pretendas esti la organizo por ĉiuj Esperantistoj. Ĉu ni povas konsenti pri tiu pretendo?

Ni certe povas konsenti pri la neceso de kunlaboro de ĉiuj Esperantistoj en la mondo. Kaj ĝuste tial IKUE kaj UEA kunlaboras kiel egalrajtaj kaj sendependaj organizoj.

Se iu do demandas al ni, ĉu ni, katolikaj Esperantistoj, subtenas kaj donas nian kunlaboron al UEA, ni povas diri: „Jes”, ĉar nia organizo kunlaboras kun UEA. Ni tamen neas, ke ĉiuj katolikaj Esperantistoj devas esti membroj de UEA! Kaj tio pro pluraj kaj diversaj kialoj: Unue ni ne povas kaj ankaŭ UEA ne povas postuli de la katolikaj Esperantistoj, ke ili estu membroj de du organizoj. Due ili same ne povas postuli, ke la katolikaj Esperantistoj pagu duoblan kotizon, abonon du revuojn, viziton du kongresojn, estu membroj de loka resp. landa katolika kaj neŭtrala rondoj ktp.

Trie la tasko por la Esperantistoj en nia propra katolika rondo estas tiom

ampleksa, ke ĝi postulas ĉiujn fortojn de la katolikaj samideanoj kaj tiam tiuj fortoj ankoraŭ estos malsufiĉaj! La katolika Esperantisto do *unualoke* estu membro de sia katolika Esperanto-organizo! Al tiu movado li donu siajn fortojn kaj konstantan subtenon kaj kunlaboron. Ĉu ni pro tio kontraŭstaras la membrecon de katolikoj en la neŭtrala movado? Tute ne, sed ne senkondiĉe! Ili estu membro de UEA nur se tiu membreco ne malutilas al iliaj agado kaj kunlaboro en nia propra rondo. Due ili estu membro de la neŭtrala movado, nur se ili konscie tie akcelu nian propran idealon!

Estas bone kaj necese, ke la katolikaj voĉo kaj opinio estu aŭdataj ĝuste en la neŭtrala movado. Niaj nekatolikaj geamkoj atendas tiun ateston ĝuste de ni! Nur se ili konas nian idealon ili povos kompreni kaj estimi nian agadon en propra medio. Se ni, katolikaj Esperantistoj, povas eksplicite al niaj nekatolikaj samideanoj kiaĵ nia propra organizo kaj agado estas necesaj, ni konstruas taŭgan kaj fidindan fundamenton por la amika kaj fruktodona kunlaboro de IKUE kaj UEA. Sed se iu sen taŭga kialo estas membro de pluraj organizoj, li nur malfortigas sian propran laborforton kaj li senigas la katolikan movadon de sia tiel necesa helpo!

* *
*

La graveco kaj aktualeco de ĉi tiu rilato postulas pluan detaligon. Oni ne konkludu el niaj vortoj, ke ni estas nur ne kontraŭ la agado de katolikoj en neŭtralaj rondoj! Male, estas bonege, ke katolikoj laboras tie kaj laboras en la unuaj rangoj. Mi eĉ kuraĝas aserti, ke ni en nia katolika movado pro tio volas perdi altvalorajn laboristojn, Kvankam laŭ nia propra tasko ni ne povas toleri tian perdon!

Se nia sankta Patro Johano la 23a en sia lasta Kristnaska mesaĝo diras: „Neniĉiel la katolikoj lasu sin redukti al pozicio de nuraj observantoj, sed ili sentu sin komisiitaj per ĉiela mandato” (VVV 1960, 81), ni, katolikaj Esperantistoj, akceptu tiun patran vorton kiel parolitan al ni. Ĝi signifas, ke ni ĉiun agadon de la Esperantistoj subtenos laŭpove per mono, per kunlaboro, per instigoj. Sed ĉiela mandato atentigas nin pri nia decido: Estas nia propra tasko direkti ĉiun agadon por Esperanto laŭ nia katolika idealo, ĉar nur tiel ni donas nian propran subtenon kaj nur tiel la agado por Esperanto vere feliĉigos la homaron. Ni klarigu al niaj katolikaj gesamideanoj, ke ili estas fratoj kaj fratinoj ne pro tio, ke ili parolas unu komunan lingvon, sed ke inverse ili parolas unu komunan lingvon pro tio, ke ili estas fratoj kaj fratinoj! Jam estas malfacila tasko inter homoj kun tiom da diversaj vivkonceptoj paroli kaj agadi pri nia vividealo en nia gepatra lingvo; — estas ankoraŭ multe pli malfacile fari tion en Esperanto. La malfacileco tamen ne malhelpu nin. Ni serĉu kontakton kaj agnosku ĉion bonan ĉe niaj geamikoj, ni serĉu same la okazon por montri pri nia religia riĉo. Inter la nekatolikaj Esperantistoj nia movado estu konata kaj nia revuo disvastigata. Jen granda tasko por ĉiu el ni! Ĉu vi ofte vidis *detalajn raportojn* pri nia movado kaj agado en la revuoj neŭtralaj? Mi bedaŭras, ke nia ekzisto estas tiel malmulte konata. Multaj Esperantistoj eĉ katolikaj Esperantistoj ne scias, ke ni ekzistas en propra organizo kaj ke ni posedas propran revuon, dum ni ĉijare ekzistas duonjarcenton! Jen nia tasko! Korespondu pri tio, montru niajn revuojn *Espero Katolika* kaj *Vojo Vero Vivo*, parolu pri ties enhavo, invitu al niaj kongresoj, parolu pri nia programo!

Ni jam posedas liston kun konsuloj en multaj urboj kaj urbetoj. Ĝi ankoraŭ pligrandiĝu. Ni same havu reton da reprezentantoj de nia movado en la multaj katolikaj internaciaj organizoj! La prospero de nia agado kaj la atingo de nia celo dependas de tio, ke ni trovos taŭgajn laborantojn por nia movado en ĉiuj landoj, kaj de tio, ke ĉiuj katolikaj Esperantistoj fidele subtenos kaj kunlaboros. Ke Dio en la Sankta Eŭkaristio vin benu je tiu laboro!

H. G. Wannemakers S. J.

45-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

en Bruselo, 30.7 - 6.8.60

Kvankam ni mem ne povis ĉeesti la 45-an U.K., ni povas doni al vi raporton, kiun ni ĉerpis el la 61-paĝa detala raporto kiun ni ricevis el Bruselo. Pro spacomanko ni nur povas doni resumon: eĉ ne estas eble nur *mencii* la 116 laborkunvenojn kaj la multegajn aliajn aranĝojn, ekskursojn ktp.

Laŭkutime okazis *Interkona Vespero*, kiun vizitis 2000 samideanoj el pli ol 40 landoj. En la solena *Inaŭgura Kunveno* la prez. de la LKK laŭtlegis leteron de la Marŝalo de la Kortego en kiu ĉi tiu informas, ke lia *Reĝa Moŝto Baŭdueno* bedauras ne povi ĉeesti kaj esprimas sincerajn sentojn. Oni decidas sendi saluttelegramon al la Reĝo. Alparolis la Kongreson diversaj eminentuloj en- kaj eksterlandaj; diverslandaj registaraj reprezentantoj kaj delegitoj de landaj asocioj parolis salutvortojn.

La *festparolado* de Prof. D-ro Ivo Lapenna estis brila kaj konvinka; li precipe akcentis la multajn klopodojn al internacia kunlaboro de la diversaj ŝtatoj, kiuj ĝis nun fiaskis, kaj eksplikis ke la ĉefa kaŭzo estas la manko de komuna tuthoma lingvo. D-ro Lapenna finis sian paroladon per la konkludo:

„La Esperanto-Movado gvidata de UEA, ĝiaj landaj, lokaj kaj fakaj organizaĵoj fariĝis hodiaŭ la bastiono de internaciismo. Ĝi jam estas tiel forta, ke ĝi povas entrepreni novan grandan kampanjon, ĉifoje por konsiderinda vastigo de la instruado de Esperanto en la lernejoj, kaj en siaj klopodoj ĝi komencas altiri la atenton de ĉiuj sinceraj internaciismaj fortoj en la mondo. Tiu nova pozicio devigas ankaŭ al novaj respondecoj. Ju pli grava estas la rolo de iu movado, ju pli da fido ĝi ĝuas, des pli da sindono, takto, inteligento estas postulataj por ne perfidi la fidojn kaj ne detruu la formiĝantajn novajn esperojn.

La hodiaŭa mondo ne plu havas multajn vojojn antaŭ si por elekti. Ekzistas nur du vojoj. Unu fatale kondukas al plena detruigo, al malapero; la alia kondukas al plia prospero en frateco, egaleco kaj libereco. Ni, la ordinaraj, la simplaj homoj deziras iri laŭ tiu dua vojo. Ju pli baldaŭ kaj ju pli rapide, des pli bone. Kaj en tiu irado ni esperantistoj, organizitaj en ĉiam pli fortaj organizaĵoj, devas fariĝi la avangardo, tiu taĉmento kiu venkas la obstaklojn, por ke la aliaj povu progresi pli facile. Rompante la lingvajn barojn kaj kreante samtempe sentojn tuthomajn kaj pensmanieron mondan, ni detruas la ĉefan obstaklon al la venko de humanisma internaciismo, kiu sola povas ne nur savi la homaron, sed ankaŭ doni al ĝi en la plej baldaŭa estonteco vivĝojon kaj feliĉon neniam spertitajn ĝis nun.”

Krom la *Ĝeneralaj Kunvenoj de U.E.A.* okazis, kiel ni jam diris, multegaj laborkunsidoj, el kiuj ni menciu nur tiujn de la Instruistoj (ILEI), Juristoj (IAJE), Kuracistoj (TEKA), Eldonistoj kaj Redaktoroj de Esperanto-gazetoj, Scienculoj (ISAE), Ĵurnalistoj (TEĴA), Skoltoj (SEL), Studentoj (STELO), Veteranoj (VEK), Intern. Geografa Asocio, Intern. Asocio de Popoluniversitatoj, diversaj religiaj unuiĝoj kiel la Kristanaj Esperantistoj (KELI) kaj

IKUE, pri kiu lasta vi jam povis legi raporton en E. K. de sept. 1960.

Kunvenis ne nur la *Komitato de UEA*, sed ankaŭ la *Komisiono pri Geografiaj Nomoj*, la *Akademio de Esperanto* kaj la *Uuiversala Ligo*.

Okazis la *5-a Internacia Infana Kongreseto* en la Kastelo de *Argenteuil apud Waterloo*, kiun partoprenis 87 geknaboj el 10 landoj, kaj la *30-a Internacia Blindulkongreso*.

La *Internacia Somera Universitato* havis tre riĉan programon: la temoj de la prelegoj de diverslandaj kompetentuloj jam pravas la miridan taŭgecon de nia lingvo sur ĉiuspecaj terenoj. (Vidu la liston en E. K. 1960, 120).

En la kunveno de la *Unua Sekcio: „Esperanto en la lernejoj“* pluraj personoj raportis pri la agado kaj sukcesoj en diversaj landoj. Ĉeestis pli ol 300 personoj. En la *Dua Sekcio: „Kontribuo de Esperanto al la granda projekto de UNESKO: Oriento — Okcidento“* la prezidanto de la kunveno, s-ro *N. Smith*, raportis, ke laŭ enketo 65% de la pola literaturo estas tradukitaj en la ĉinan lingvon dank' al Esperanto kiel „pontlingvo“; aliflanke la lastaperinta verko de S-ro *T. Sekelj* „Nepalo malfermas sian pordon“ estas jam tradukita en plurajn naciajn lingvojn. S-ro *T. Sekelj* raportas pri sia agado en *Hindujo* -prelegoj pri okcidenta civilizo- kaj en *Japanujo* -52 prelegoj, el kiuj 2 ĉe la televido-.

La kunveno, kiun ĉeestis 250 personoj, rekomendis pli vastan kontakton inter Oriento kaj Okcidento, precipe kun Azio kaj Afriko, ankaŭ per interŝanĝo de prelegoj, sonbendoj, lumbildoj, filmoj kaj ekspozicia materialo, ne forgesante la korespondadon inter diversaj grupoj.

Al la *Oratora Konkurso* partoprenis 5 personoj, el kiuj ricevis premiojn:

I. *Carlo Minnaja, Italujo*: „Internaciismo, naciismo kaj patriotismo“;

II. *John Wells, Britujo*: „Internaciismo kaj patriotismo“;

III. *Nicolas Minnaja, Italujo*: „La sporto, ĉu internacia rimedo por amikiĝo?“
Aŭtoro de la jaro fariĝis s-ro *Tibor Sékelj, Jugoslavio*.

La LKK zorgis ankaŭ por kulturo kaj amuzo: okazis Belga vespero, muzika vespero, multaj filmoj pri Belgujo estis montrataj; dum du Teatraj vesperoj ludis la *Internacia Arta Teatro* kun 7 profesiaj geaktoroj el Jugoslavio en „Kurioza Okazaĵo“ de Carlo Goldoni kaj „Friponaĵoj de Skapeno“ de Molière. Al Junulara vespero partoprenis 200 gejunuloj el 40 landoj.

Oni faris ekskursojn al diversaj urboj kaj regionoj de Belgujo, al muzeoj, radiostacio, banko, ktp. Kaj kompreneble okazis la kutimaj *Bankedo* kaj *Balo*.

En la *Ferma Kunsido* s-ro *M. Jaumotte*, prezidanto de la LKK, laŭtlegis dank-telegramon de la *Reĝo Baŭdueno* kaj S-ro *Jervis* prezentis raporton pri la *Belarta Konkurso* kun jenaj rezultoj:

Originala Poezio: 1. S-ro Jiri Korinek, Ĉeĥoslovakujo (Romano F-majora de Beethoven);

2. S-ro Ludoviko Izak, Ĉeĥoslovakujo (Al Altaj Tatroj);

3. S-ro A. Sandor Csaszar, Hungarujo (Mi staras antaŭ via kruco, Sinjoro).

Tradukita Poezio: 1. S-ro Albert Samyn, Belgujo (Adiaŭa kanto, de P.C.Hooft)

2. la sama (Luna ĉe Endimion, de Hubert Poot)

3. S-ro Miyamoto, Japanujo (Amo sur plaĝo, de Sato Haruo)

La Komitato decidis intensigi la rilatojn kun UNESKO, reorganizi la filman servon kaj ke UEA aĉetu propran domon en Rotterdam.

Post kiam S-ro *N. Smith* kiel prezidanto de Brita Esperanto-Asocio priskribis la regionon de *Harrogate, Britujo*, kie okazos la 46-a U.K. en 1961, s-ro *Jaumotte* transdonis la grandegan Kongresan flagon al samideanino el Harrogate. Per kantado de himno la kongreso finiĝis.

ARGENTA JUBILEO

(Al sacerdoto Alfons Beckers okaze de lia 25-jara sacerdota jubileo)

En tiu sama jaro
Ni ambaŭ al altaro
Ĝojplene iris,
En manoj kun kaliko,
Ĉirkaŭitaj per amikoj
Kaj diris:

— *Introibo ad altare Dei.*
Mea culpa... miserere mei...
Kaj akceptu mian oferon:
Por gepatroj, amikoj, bonfarantoj,
Por animoj en purgatorio suferantaj,
Donu al ili pacon kaj esperon.

Kaj de tiu momento
La jaroj flugis kiel vento,
Kun deziroj kun juneco,
Nun jam dudek kvin en pasinteco
Kiel vento de printempa mateno.
Kun ĝojo, sufero kaj ĉagreno.

En jubilea tago l'animo kantas:
Gloro al Vi, Dio sankta,
Gloro kaj danko senlima:
Pro tiom da gracoj donitaj,
Pro tiom da agoj benitaj,
Pro tiom da savitaj animoj.

Hodiaŭ mi havas nur unu deziron
Kun via beno per vivvojo iri
Kaj porti savon al homaro laca;
Anstataŭi Kriston sur la tero
Prediki amon, kompaton, veron,
Ekflamigi deziron por paco.

Kaj poste kiam miaj fortoj estos elĉerpitaj
Kaj ĉiuj teraj taskoj plunumitaj,
Prenu min en la ĉielon.
Por ke mi povu eterne Vin adori,
Ripozi sur via sino kaj glori
Kun sanktuloj kaj anĝeloj...

Jozefo Zesas, Pollando, 10.8.60.

+

LA NOVA TESTAMENTO EN ESPERANTO

Jam dum jaroj multaj katolikaj Esperantistoj deziras posedi katolikan eldonon de la Sankta Skribo en Esperanto. Por komenci tiun eldonon ni jam aperigis en VVV en ĉiu numero parton de la Nova Testamento. Krome ni fondis la Biblio-fonduson, al kiuj pluraj membroj de tempo al tempo sendas etajn kaj grandajn donacojn. La realigo de tia eldono tamen ne nur kostas multan monon, sed ankaŭ multan laboron. Pro ambaŭ kialoj daŭrus multajn jarojn ĝis ni povus eldoni la kompletan tekston.

Tial la fukciuloj de IKI kaj IKUE priparolis la aferon kaj la rezulto estas, ke ni baldaŭ eldonos la jam pretan parton en formo de aldonoj al Espero Katolika. Ni decidis komenci en januaro 1961 kaj metos ĉiun duan monaton aldono de 8 paĝoj en nian revuon. Tiel niaj legantoj ĉiujare ricevos 48 paĝojn je la formato de E.K. La paĝoj estos fiksataj en la revuo tiel, ke oni facile povos elpreni ilin.

Ni unue publikigos la sanktan Evangelion laŭ Mateo. Sur paĝo 3 de la kovrilo vi vidas unu paĝon el tiu Evangelio kun klarigaj notoj, do vi jam povas prijuĝi la aspekton.

Ĉi tiu metodo havas la grandan avantaĝon, ke ĉiuj niaj membroj-abonantoj ricevos la biblian tekston. Certe tre multaj ĝojos pro ĉi tiu iniciato.

Ni ne intencas plialtigi la jaran kotizon de nia revuo. Sed vi komprenas, ke la kostoj por realigi nian planon estas sufiĉe altaj. Tial ni volonte petas ĉies helpon. Se vi bonvolas doni jare unu guldenon = 4 stelojn krome, ni povos en unu jaro aperigi 6-foje 8 paĝojn.

➡



ENIRU EN LA ĜOJON DE VIA SINJORO.

Mt 25, 21 - 23.

Mi estis infaneto. Postkuris mi la nubon,
mi ridis al la suno, mi floris ĉiun floron,
kaj mi aŭskultis rave susuron de la pluvo
kaj de l' pasio juna el propra juna koro.

Mi estis fianĉino, kaj arde mi dorlotis
la vortojn, la rigardon kaj ĉiun varman kison
de tiu, kies amo kaj kies rid' pilotis
du disajn vivojn kune kun ĝojo al maldiso.

Mi estis jam edzino! Mi kiel vinberarbo
kreskadis laŭ la muro de lia fideleco,
kaj ŝirkolektis kune ĝis ununura garbo
la florojn de la amo l' edzino kaj la edzo.

Mi naskis infaneton. Ĝin nutris mia lakto
fluanta en la buŝon, - ho eta roza floro! -,
kaj aro da nometoj sufiĉis ne al fakto
ke granda estis l' amo de la patrina koro.

Folion post folio senigis la aŭtuno
de l' vivo min je edzo, juneco kaj infano.
Mi staras nuda, Dio. Kaj jen subiras suno:
Ĉu mi senlume glitos en noktan uraganon?

Ĉu por soleco mia ne apud fajro loko?,
nenia ajn ŝirmejo laŭ la soleca vojo?
El fundo de la koro laŭtiĝas jam la voko:
eniru mi, ho Dio!, en Vian adan Ĝojon.

Ho Via Ĝojo estas tro granda por mi, homo,
ĝi supervolbas ade min, ĉiela melodio.
Kaj tamen tie nure, nur tie estas Domo,
la nura Domo kiun Vi revis por mi, Dio.

Rik de Rover. Borgerhout, Belgujo.

La Biblio-fonduso ebligas al ni pagi la kromajn kostojn kaj presigi pli grandan kvanton de la teksto, tiel ke ni povos disvastigi tiun pere de IKI.

Ni jam konas nian abonantaron kaj scias, ke la plej multaj ĝoje ekscios pri nia plano kaj komprenante la financajn konsekvencojn volonte helpos por efektiviĝi ĝin.

Povas esti, ke ni ĝuste pro tiuj Biblio-aldonoj akiros multajn novajn abonantojn. Tial grandan kvanton de ĉi tiu oktobra numero ni dissendas al katolikaj samideanoj, kiuj nun ne abonas je EK kaj ni proponas tuj aboni, por ke ni sciu kiom ni plialtigu la eldokvanton. Ankaŭ al niaj fidelaj membroj ni urĝe petas jam nun pagi la kotizon pri 1961, por ke nia kasistino ne havu zorgojn pri la preskostoj. Plej koran dankon al ĉiuj bonvolaj helpantoj!

LA NOVA ĈEFURBO DE BRAZILO

La 21-an de aprilo 1960, dum entuziasmaj aplaŭdoj de granda homamaso antaŭ la fama „*Palácio da Alvorada*” (Palaco de l’Tagiĝo), Lia Prezidanta Moŝto D-ro *Juscelino Kubitschek de Oliveira* oficiale inaŭguris *Brasília-n* (pron. Brazilja) la novan ĉefurbon de Brazilo.

Centmiloj da personoj el ĉiuj partoj de la terglobo — ambasadoroj, ministroj, ŝtatestroj, parlamentanoj — reprezentantoj de plej diversaj religiaj kaj politikaj vivkonceptoj, laboristoj kaj soldatoj, estis kunvenintaj por saluti la naskiĝon de la nova metropolo. La gazetaro de kvin kontinentoj dediĉis tutajn paĝojn al la priskribo de la ĵus naskita urbo. Multaj nomis ĝin „la plej rimarkinda historia fakto de nia jarcento”; aliaj profetis, ke ĝi signas „la komencon de nova erao de progreso por Brazilo”. Ne mankis ankaŭ fervoraj kontraŭuloj, por kiuj la konstruado de Brasília estis frenezaĵo malutila al la nacio.

Ne estas ĉi tie la ĝusta loko por diskuti la motivojn de tia malsameco de opinioj. Nia intenco estas fari resumon pri la urbo mem, pri ĝiaj origino, konstruado kaj aspekto.

La ideo starigi la ĉefurbon de Brazilo sur la centra altebenaĵo ekzistas jam de longe. Historiistoj rakontas, ke en la 17a jarcento oni jam revis pri la instalo de la registaro en tiun parton de la lando, kie ĝi estus pli facile defendebla kontraŭ eventualaj atakontoj kaj — eĉ pli grave — ebligus konvenan disvolviĝon



de vastegaj regionoj de la brazila internlando, kies naturaj trezoroj restas ĝis nun neesploritaj kaj preskaŭ nekonataj de la brazilanoj. Eminentuloj de la imperio kaj de la respubliko tra generacioj subtenis la ideon, kiu fine kiel leĝo fariĝis parto de la brazila konstitucio.

Malgraŭ tiu agnosko fare de la plej altaj institucioj de la respubliko la plano pri transloko de la ĉefurbo al la ŝtato Goiás ne ricevis la necesan atenton de la sekvantaj registaroj kaj estis pli malpli forgesita dum pli ol kvindek jaroj. La nuna prezidanto, d-ro Juscelino Kubitschek, serioze konsiderinte la problemon tuj en la komenco de sia administrado, al ĝi dediĉis la plej bonan parton de siaj laboroj, ĝis li sukcesis trovi definitivan solvon por ĝi.

La konstruado de Brasília okazis en mirinde mallonga tempo. Antaŭ kvar jaroj la regiono, kie hodiaŭ staras ĝiaj majestaj konstruaĵoj el fera betono, aspektis

ankoraŭ sovaĝa kaj dezerta. La starigo de moderna ĉefurbo sur tiu kruda ebenaĵo en la limtempo difinita de la prezidanto ŝajnis al multaj naiva, neefektivebla utopio. La faktoj tamen pruvas, ke la prezidanto estis prava: Brasilia hodiaŭ estas nekontestebla realaĵo.

Ĉirkaŭ sesdek mil laboristoj sub la gvidado de inĝenieroj kaj arkitektoj streĉis siajn fortojn dum pli ol tri jaroj por ebligi tion, kion ni hodiaŭ vidas: science konstruitan urbon kun larĝaj avenuoj, imponaj monumentoj kaj mirindaj palacoj, efektiva modelo de arkitektura beleco. La gvidplanon de la nova ĉefurbo verkis la brazila arkitekto Lúcio Costa; la ĉefa zorgo de ĉi tiu altnivela artisto estis, ke la stratoj kaj viaduktoj de Brasília ebligas trafikon senĝenan kaj liberan.

Alia karakteriza trajto de la nova ĉefurbo estas ĝiaj palacoj kaj publikaj konstruaĵoj. Multaj el ili mirigas la observantojn pro la originaleco kaj revolucia beleco de siaj linioj. La palaco Alvorada kaj tiu de l'Kongresejo, starigitaj sub la direkto de Oskaro Niemeyer, estas hodiaŭ konsiderataj en la tuta mondo kiel ĉefverkoj de la moderna arkitekturo. La artefarita lago sesdek du kilometrojn en sia periferio, la dek sep viaduktoj el ferbetono, la tricent kilometroj da asfaltitaj stratoj, ĉio tra la tuta urbo donas impreson, kvazaŭ ĝi estus ia simbolo de la estonteco.

Brasilia vivas nun sian suĉinfanan periodon. Kelkaj gravaj konstruaĵoj ankoraŭ ne estas finfaritaj, ekzemple la urba katedralo. Montriĝis, ke la flughaveno ne perfekte taŭgas por ricevo de la plej grandaj aviadiloj. Ekzistas do diversaj punktoj, kiujn estas necese kompletigi kaj perfektigi. Tio estas komprenebla. Sed la juna koro kaj la arterioj de la „ĉefurbo de l'estonteco“ jam komencis pulsii kun energia optimismo. Ekfunkciis ĝiaj lernejoj kaj publikaj institucioj, la Parlamento kaj la Supera Tribunalo regule kunvenas, kaj la prezidanto mem, de sia palaco kaj ankaŭ sur la stratoj, vigle direktas la laborojn por kompletigo de la granda verko.

Ĉu Brasília efektive kontribuos por la rapida disvolviĝo de la brazila internlando, ĉu ĝi fariĝos reala, kaj ne nur oficiala ĉefurbo de Brazilo, tio estas demando kiun solvos la estonteco. Ni tamen devas esti justaj kaj agnoski, ke por tia popolo, el kiu naskiĝis la konstruintoj de Brasília, tiaj aferoj ne estas neefektiveblaj utopioj.

Al d-ro Juscelino Kubischek de Oliveira, kiu ĉiam favoris Esperanton kaj bonvole akceptis la membrecon de la Internacia Patrona Komitato de la Zamenhof-Jaro, la Brazila Esperanto-Ligo kaj la Universala Esperanto-Asocio sin turnis kun gratuloj pro la grava evento kaj kun peto, ke en la nova ĉefurbo estu donata al strato aŭ placo la nomo Zamenhof aŭ Esperanto.

Floriano Pessoa

NI FUNEBRAS

Je la 19a de aŭgusto 1960 en Zagreb (Jugoslavujo) mortis la 90-jara meritplena veterano s-ro *Leono Kaŭriĉ*, pensiita juĝa konsilisto. Li esperantistiĝis en sia juneco kaj publikigis kelkajn rakontojn en esperantaj revuoj kaj okaze de naskiĝtagoj kaj nomfestoj de samideanoj li gratulis per poemoj. Pro tio oni lin nomis simple „Agla Bardo“. Li estis praktika katoliko, ofte ricevanta la sakramentojn, sed dum la lastaj du monatoj li jam ne povis viziti la preĝejon. Lia animo ripozu en paco!



La germanlingva revuo „Eŭropa” (por politiko, ekonomio kaj kulturo), eldonata de Maria L. Bohnenberger en la Eŭropa-Verlag Bad Reichenhall, en sia junio numero 1960 enhavas artikolon de Max Beloff kun la titolo:

23. „Kulturaj taskoj por la unuigo de Eŭropo
Toynbee volas lingva(-n) franca(-n)”

(sur paĝoj 48/49)

„En Romo kaj Strasburgo okazis en la jaroj 1953 kaj 1956 sub la protektado de la Eŭropa Konsilistaro du longaj diskutoj inter eŭropaj pensistoj, politikistoj kaj publicistoj. Arnold Toynbee, Alcide de Gasperi, Robert Schuman, Ernst Friedländer, L. Hommel,

Guido Piovene, Gabriel Marcel, F. A. von der Heydte kaj multaj aliaj partoprenis. La diskutojn, kiujn estris la direktoro de la „Centre Europeen de la Culture” en Genevo, Denis de Rougemont, tuŝis ĉiujn aspektojn de la unuigado de Eŭropo — do ekonomiajn kaj politikajn kiel ankaŭ historiajn, kulturajn kaj sciencajn problemojn. Ilia celo estis, reliefi kaj, se eble, klarigi fundamentajn demandojn. Resumon de ĉi tiuj diskutoj, kiuj jam pro la kvalito de la partoprenintoj meritas apartan atenton, donas Max Beloff, Nuffield College (Oxford) en sia libro „Europa und die Europäer” (Eŭropo kaj la eŭropanoj) — 412 paĝojn — aperinta en la Eldonejo por Politiko kaj Ekonomio, Kolonjo. El tiu ni prenis la sekvantan eltiraĵon:

„Kelke da radikaluloj agas, kvazaŭ estus eble krei por Eŭropo unusolan sistemon de la pli alta instruiteco aŭ reveni al tia sistemo — sistemon de tute libera anstataŭigebleco de instruistoj kaj instruoj. Sed tio estas tute klare iluzio, ĉar tia sistemo antaŭkondiĉas, ke ekzistas artefaritaj, fare de la ŝtato kreitaj (starigitaj) limoj kaj ne naturaj bariloj de la lingvo kaj kulturo. Eĉ ne Svislando havas, krom teknikan, „nacion” universitaton.”

Poste la artikolo daŭriĝas:

„Kaj nun ankaŭ vorton pri la grava rolo de la lingvo — tiel kiel interligilo kiel ankaŭ barilo. Neniu, kiu foje partoprenis internacian konferencon — egale de kiu speco — povas lasi flanke la duan aspekton (= lingvo kiel barilo). Kiel ni povas venki ĝin? Dum ambaŭ diskutoj, en Romo tiel kiel en Strasburgo, energie estis malakceptata la ideo pri artefarita lingvo. Unue, tiel estis dirate, gravaj nuancoj de la vivanta lingvo tute ne estas esprimeblaj en *Esperanto*, *Ido*, *Novial ktp.* Due artefarita lingvo estus nur kroma ŝarĝo por la malgrandaj landoj. Tiel longe kiel la grandaj landoj publikigas ankoraŭ verkojn en siaj propraj lingvoj, la enloĝantoj de la malpli grandaj landoj devas lerni tiujn lingvojn; kial ili nun ankoraŭ lernu unu plian lingvon? La samaj kontraŭdiroj povas esti direktataj kontraŭ *basic English* kaj *Français élémentaire*.

Kiu lingvo estas elektenda?

En Norvegujo kaj Nederlando eĉ la lernantoj de la elementaj lernejoj lernas unu fremdlingvon. En Nederlando en la altlernejoj estas instruataj la angla, franca kaj germana lingvoj; norvegoj lernas la unuajn du en la reallernejo, francan lingvon ankaŭ en la gimnazio. La spertoj de la malgrandaj landoj permesas la konkludon, ke al la pli grandaj landoj mankas la decidemo rilate al ĉi tiu aspekto de la edukado. Ĝia signifo estis agnoskata oficiale flanke de la Ministro-komitato de la Eŭropa konsilistaro. Kiu lingvo estas elektenda



JUGOSLAVIO. Ekzistas nun 127 lernejoj diversgradaj, en kiuj oni instruas Esperanton al preskaŭ 40000 gelernantoj. *

POLUJO. Esperanto estas instruata en multaj lernejoj, precipe al geinstruistoj. Projekto pri enkonduko de Esperanto en 50 lernejojn estas transdonita de la resp. ministro al la koncernaj departementoj por plua prilaboro kaj realigo de la afero. Kartoteko pri la instru-

istoj, kiuj instruas Esperanton, enhavas 360 nomojn. La Ministerio por Superaj Lernejoj donis la permeson starigi Esp.-lektoratojn en 4 universitatoj.

FRANCUJO. La Ministro por Edukado, S-ro *Maurice Hercog*, estas favora al Esperanto: dum la lastaj jaroj li duobligis la subvencion por nia movado, kaj nun li okazigis du provojn de deviga instruado de Esperanto; krom tio okazas deviga kurso por 600 gejunuloj en *Versailles*. *

La 52-a Nacia Kongreso en *Montélimar* estis granda sukceso: pli ol 240 personoj inter kiuj pluraj eksterlandanoj, ĉeestis; la organizo estis bonega; oni ne nur faris ekskursojn, ĉeestis teatraĵon kaj diversmaniere amuzis sin, sed ankaŭ faris multan kaj utilan laboron. *

LA POLA RADIO ĉiutage prenis informojn pri la 45-a U. K. en Bruselo kaj disaŭdigis la novaĵojn pri la Kongreso, destinitajn precipe por tiuj kiuj ne havis eblecon ĉeesti ĝin. Ĝi ankaŭ sendis, same kiel **RADIO ZAGREB**, apartan ĵurnaliston al la Kongreso por surbendigi la programon kaj sekvi la Kongreson. Dissendoj okazis la 11-an kaj 18-an de aŭgusto pere de Radio Zagreb.

BRAZILO. La brazila filmproduktanto *Lima Bareto* en sia proksima filmo „La unua meso” uzas la portugalan lingvon kaj Esperanton por la paroloj: la Esperanta interpreto estos destinata, por eksporto, laŭ deklaroj de la aŭtoro mem, kiu klarigas ke li per tio povas kalkuli jam de nun je tre garantiita merkato el milionoj da enirbiletoj! *

En la *Seminario Sacramentino* en *Monte Santo de Minas, Sul de Minas* ekzistas Esperanto-grupo **SEMO** de 26 seminarianoj. La filozofistudento *Frato Severiano de Souza S.S.S.* gvidas kurson kaj la superuloj multe apogas lin en lia laboro, post kiam ili donis al li eblecon, sekvi la Profesoran kurson ĉe la Brazila Esperanto-Ligo en *Rio de Janeiro*, de kiu li ricevis la diplomon. La klubo havas propran himnon, verkitan de Frato de Souza kaj komponitan de la studento-orgenisto de la Seminario. La unua membro de **SEMO** estis *Patro Pedro Cerri*, Spirita Direktoro de la Seminario. **SEMO** havas propran revueton, kies artikolojn verkas la membroj mem. *

- tio estas afero, kiu certe ne estu aranĝata per dekreto. La opinio de profesoro Toynbee: „franca lingvo estas necesa kaj krom tio oni prenu la lingvon de Nordameriko, ĉar la amerikanoj ne lernus alian lingvon”, por eŭropanoj preskaŭ ne estas akceptebla. Sed verŝajne la angla lingvo — kaj estus nur pro sia signifo por la scienco-konseervos sian unualokan pozicion, en kiu ĝi anstataŭis la francan lingvon, se ĝi (la angla lingvo) aliflanke ne estos forigata de la rusa lingvo.

La lingva problemo entenas ankoraŭ ĉiam politikan eksplodadon, kun kiu oni devas kalkuli. Kaj tion malgraŭ la problemoj, kiujn elvokas la rilatoj kun la problemoj de la malplimulto — kvankam ĉi tiuj demandoj post la deviga transloĝiĝo de nia jarcento hodiaŭ iom estas plisimpliigitaj”.

Sendis Anton Kronshage



Sylla Chavas: ANIMO PRISMA. 112 pĝ. 21,5 × 15 cm broŝurita Eldonis: *Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro, Brazilo, 15.12.1959.* Prezo ne menciita. — Jen denove poemaro! Estas altflugaj, ofte profundaj pensoj de denaska poeto, kiu kreis multajn poemojn en sia nacia lingvo kaj en Esperanto. La poemoj estas prezentitaj en bela formo; la unua parto enhavas futurismajn poemojn, en kiu interpunkcio tute mankas; la dua parto konsistas el majstraj sonetoj, kelkaj tre etaj, en unusilabaj versoj, en „klasika formo”. Ni povas rekomendi la poemaron al maturaj esperantistoj.

ESPERANTO JUNULKURSO: kun permeso de SAT-Amikaro, Parizo, represis *Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro, Brazilo.* 92 pĝ. 23 x 16 cm. Tre bona kurso laŭ direkta metodo, kun ilustraĵoj, instrukcioj por la kursgvidanto kaj por ĉiuj 20 lecionoj mallonga gramatika ekspliko en portugala lingvo. Prezo ne menciita. *

KIE ABUNDO ESTAS MALOFTA KAJ MANKO PLI MALOFTA...DANIO. 32 pĝ. 21 × 14 cm 1960. Montriĝas ke ĉiam novaj broŝuroj eldonitaj de landoj kaj urboj aperas en Esperanto; tio pruvas ke aŭtoritatuloj pli kaj pli konvinkiĝas pri la uzebleco de nia lingvo. Ĉi tiu libreto rakontas pri ĉiuj facetoj de la vivo en Danlando; granda nombro da ilustraĵoj sur bonega fotopapero klarigas kaj ornamas la tekston. Senpage havebla ĉe la danaj Legaciaj kaj Konsulejoj en ĉiuj landoj. * *Ole Nederland: TOM KAJ TINA.* Internacia Esperanto-lernolibro por Infanoj. 44 pĝ. 23 × 15,5 cm. Eldonis: Dansk Esperanto-Forlag, Abyhøj, Danujo. Prezo Dkr. 5,50 = 3,30 ned. gld. La libreto havas plaĉan aspekton, la preso estas tre klara, la desegnoj spritaj, la lecionoj riĉenhavaj kaj bonegaj por instrui al infanoj, paroli simplajn frazojn en Esperanto. Pro la nura uzo de Esperanto la libreto taŭgas por internacia uzo. Ŝajnas al mi tamen, ke la alta prezo por multaj estos malhelpo. La eldonisto aldonas, ke aparta „Instrukcio-metodiko kaj konsiloj” por la instruisto estas havebla por la prezo de Dkr. 2,— = 1,10 gld. Recenzekzempleron de lastnomita libro ni ne ricevis. *

Novaj prospektoj en Esperanto:

BRUSELO, 16 paĝoj 10 × 14 cm. riĉe ilustrita per multaj belegaj fotoj. Eldono: Informa Centro de Bruselo, Rue du Chêne 10, Bruselo. *

BRUSELO BELGUJO, 8 pĝ. 10 × 20 cm. Multaj artaj kolorbildoj kun subskriboj pri la belga ĉefurbo. Eldono: vidu supre. *

ANTVERPENO ATENDAS VIN, 12 pĝ. 20 × 21 cm. sur kolora fotopapero. Multaj, vere artaj bildoj kun abunda teksto en Esperanto. Eldono de la Urbo Antverpeno. *

VIENNE EN DELFINIO, ilustrita faldfolio pri nomita urbo apud Liono. Priskribo de la multaj antikvaj monumentoj. Eldono de: *Syndicat d'Initiative,* Korto de la Klostro, *Vienne (Isère) Francujo.* *

DOMFRONT, bele ilustrita faldfolio kun tekstoj en franca lingvo kaj Esperanto. Eldonis: *Syndicat d'Initiatives, DOMFRONT (Normandie) Francujo.* *

Truus Durenkamp.

BULGARIO, respondeca redaktoro kaj kompilinto *Bojan Balabanov.* Eldonejo de literaturo en fremdaj lingvoj, *Sofio,* 1959, 281 p; ilustr., du mapoj pri Bulgario, prezo nemontrita.

Flanke de eldonoj pri aliaj landoj kiel „Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj”, „Faktoj

pri Ĉeĥoslovakujo", ĉi tiu libro detale informas pri Bulgario. Ĝi bele aspektas, multaj fotoj plibeligas la enhavon, la lingvo ĝenerale estas korekta. Jen trajtoj, kiuj validas same por diversaj aliaj eldonoj en Esperanto el la nuna Orienta Eŭropo.

Ili atestas pri teknika evoluo, sed same pri materialisma vivkoncepto. Konsekvence oni misdeseĝnas la historion kaj la kulturkreatan karakteron de la kristana religio. Jen la kialo, pro kiu la legado de tiaj eldonoj ĉiam montriĝas enuiga. Ili daŭre memorigas la vorton de Jesuo al Satano: „Ne sole per pano vivas la homo, sed per ĉiu vorto, kiu iras el la buŝo de Dio” Mt 4,4. *

JUGU MEM. Faktoj pri Ĉeĥoslovakujo, el la ĉeĥa lingvo esperantigis *Miloš Lukáš*. Eldonis: *Orbis, Prago*, 1960, 83p; pr. unu resp. kup. La titolpaĝo plue indikas la ĉefan enhavon: La loĝantaro kaj historio — La reĝimo — La civitanaj liberrajtoj — La strukturo de l'industrio, komerco kaj agrikulturo — La socio kaj familio — Sanitara prizorgado — Kulturo kaj sporto.

En recenzo pri „Bulgario” ni jam donis kelkajn trajtojn, kiuj ankaŭ troviĝas en ĉi tiu libreto. Ekzemple ni citas el la ĉapitro „Religia libereco”: „La pastroj plene partoprenas la publikan vivon. Ili estas membroj de la registaro (unu estas ministro, du aliaj membroj de la slovaka Kolegio de la Komisaroj), deputitoj, membroj de naciaj komitatoj ĉiugradaj, estraranoj de unuecaj agrokoooperativoj ktp.” (p. 12).

NOTO: Malgraŭ la „Religia Libereco” nia politike absolute neŭtrala revuo ne estas allasata: ni skribis pri tio al la eldonejo, sed ne ricevis respondon.

KATALOGO PRI LA KOLEKTOJ DE INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO EN WIEN. Parto II: sistema katalogo pri la presaĵoj de la NE-Esperanto- Artefaritaj Lingvoj (Volapük, Ido, Interlingue, Interlingua, ktp) laŭ la Internacia Dekuma Klasifiko, verkita de Hugo Steiner.

Eldonis: *IEMW, Wien I, Hofburg, Aŭstrujo*. 1958, 93p; 21 : 29 cm. Prezo 14 resp. kup.

Pri Parto I de ĉi tiu katalogo ni jam detale skribis en EK 1959, 36-37, kaj tie volonte menciis la promeson de la aŭtoro rilate aldonan katalogon pri lingvoprojektoj. Jen per Parto II li plenumis tiun promeson. Valore kunlaboris Vilhelmo Reinke kiel dokumentalisto kaj Enkondukon verkis Hugo Sirk.

Jam ofte Esperanto-eldonoj estas malfacile konsulteblaj kaj tial la IEMW estas necesa fonto. Rilate la multajn lingvoprojektojn tiu neceso estas ankoraŭ pli granda, ĉar la eldonkvanto de multaj tiaj eldonoj estas pli malgranda. Tiel la nuna Parto II „certe donos al la interlingvistoj la eblecon al ampleksaj esploradoj” kiel la Antaŭparolo prave rimarkigas. Speciale menciindaj estas la gravaj kolektoj pri Volapük kaj Ido.

Alfabeta listo pri la artefaritaj lingvoj kun la koncernaj DK-numeroj p.9-11 antaŭas la Sisteman Liston p.13-91.

Ni volonte deziras, ke same sukcesplene s-ro. Steiner povos fini la Parton III-an, kiu donos kompletan alfabetan katalogon.

H. G. Wannemakers S.J.

NIA JUBILEA KASO

ricevis nenion de post 15.8.60. Eble la ferioj kulpas!

FILATELIO



AŬSTRALIO. Okaze de Kristnasko aperis unu p.m.: 5 p. violblua. Bildo: La Tri Saĝuloj el la Oriento, sidantaj sur kameloj survoje al Betlehemo.

BELGUJO. La bildoj de la tuberkulozomarkoj rilatas al la folkloro (5 valoroj) kaj religio (2 valoroj):

7 F + 3 F – „Paco” – Virgulino.

6 F + 2 F – „Paco” – Naskiĝo;

La „Madono de la Paco” sur la lastnomita p.m. estas ligna statueto el la 17a jarcento.

BRAZILO. La konata bildo „Kristo sur la terglobo” sur p.m. de Cr. 2.50, blua. En la rando la teksto: „Dia Universal de Acao de Gracias”.

KOSTARIKO. 5 ct., verda, portreto de *Patro Flanagan*. Bonfarmarko por la junularo.

FRANCUJO. *Serio Ruĝa Kruco (2 valoroj):

20 + 10 Fr., brune violblua, nigra kaj ruĝa: portreto de *Abbé de l'Epée*;

25 + 10 Fr., nigra, bruna kaj ruĝa: portreto de *Valentino Haŭly*.

Abbé de l'Epée estis la diligenta kaj bonfarema protektanto kaj spirita patro de la surdmutuloj; *Valentino Haŭly* estis la subtenanto de la blinduloj. Projekto kaj gravuraĵo de la marko de *J. Piel*.

*Afrankmarko, 20 Fr., blua kaj flava. Urbvidaĵo *Averne sur Helpe* kun la turo de la preĝejo de Sta. Nikolao. La turo estas alta 60 metrojn kaj havas bonegan sonorilaron kiu konsistas el 48 sonoriloj.

*El la turistserio ni mencias: 15 Fr., blua kaj malhele blua: la katedralo de *Laon*. Gravuraĵo de *Cami*;

1 Fr., multkolora: la „*Grand Bénard*” kun la preĝejo de *Silaos, Réunion*. Gravuraĵo de *Hertenberger*

SAN MARINO. *Pro la fakto ke antaŭ 100 jaroj aperis la unua poŝtmarko de *Romagna*, aperis 2 p.m., el kiuj ni mencias: 120 L, verda kaj nigra. Bildo: la preĝejo de *Bologna*. La malrektaj turoj sur la marko estas konstruaĵoj el la 12-a jarcento. La turo „*degli Asinelle*” estas 100 metrojn alta; la turo „*di Garrisenda*” estas 50 metrojn alta; ĉi lasta estis antaŭe pli alta; oni duone malkonstruis ĝin pro danĝero de ruiniĝo.

ITALIJO. *Antaŭ cent jaroj aperis la unua poŝtmarko de *Sic'lio*. Por memorigi tiun okazintaĵon estis eldonata serio, el kiu estas taŭgaj por nia kolekto „Religio”: 1 L, okrokolora kaj bruna; ĉefenirejo de la preĝejo de *Messina*; 3 L, blua kaj griza: Sanktejo de *Erice*; 15 L, multkolora: preĝejo de Sta. Johano de la Ermitoj (*San Giovanni degli Eremiti*), konstruaĵo el la normana tempo. Kun la kvin ruĝaj kupoloj ĝi havas propran karakteron kaj datiĝas el la jaro 1132. La tute rekta konstruaĵo sen ia ornamajo respeguligas puran arĥitekturon.

NIKARAGVO eldonis la t.n. *Kardinalo Spellman*-serion, kiu konsistas el 5 afrankmarkoj (A) kaj 7 aermarkoj (B), multkoloraj:

5 ct. (A) kaj 35 ct. (B): Kardinalo Spellman kaj Papo Johano;
 10 ct. (A) kaj 1 C. (B): Blazono de kardinalo;
 15 ct. (A) kaj 1.05C. (B): Portreto de la kardinalo;
 20 ct. (A) kaj 1.05C. (B): La kardinalo kaj la studentoj;
 25 ct. (A) kaj 2 C. (B): Portreto de la kardinalo;
 30 ct. (B) kaj 5 C. (B): Flago de Nikaragvo.
 Kardinalo Spellman, ĉefepiskopo de Novjorko (5-4-1939), sacerdoto ek de
 14-5-1916, naskiĝis la 4-an de majo 1889 en *Whitman, Mass.*

NEDERLANDAJ ANTILOJ. Okaze de la 100-jara datreveno de l'morto de
 Monsinjoro *Martinus Joannes Nieuwindt* aperis 3 p.m. kun liaj portreto,
 blazono kaj subskribo. Kiel misiisto li laboris ek de 1824 dum 36 jaroj en
 la Nederlandaj Antiloj.

HISPANUJO. *La unuaj p.markoj el serio, kiu prezentas monaĥejojn kaj
 abatejojn rilatas al la monaĥejo de la *Madono de Guadalupe*:
 15 cts., bruna: korto kaj koridoro, 80 cts., grizverda: la monaĥejo,
 1 pta., brunruĝa: portalo de la preĝejo. La serio aperis okaze de la ora
 jubileo de la Franciskanoj en la monaĥejo. En 1908 la patroj trovis mona-
 ĥejon kiu estis en malzorgita stato, escepte grandampleksa muzikarkivo.
 Multajn aliajn artaĵojn oni forrabis dum la antiklerika regado de 1835.
 Antaŭe la monaĥejo jam havis longan kaj interesan historion.

*La Kristnaskmarko, 1 pta., ruĝbruna, montras la Stan Familion laŭ pen-
 traĵo de *Goya*, kiu sin trovas en la *Prado* en *Madrid*.

J. S. Jansen.

ANONCETOJ

SOPIRE SERĈATAJ por grava Instanco! UEA-Esperanto jarkolektoj 1939,
 1940, 1941, 1942, 1946; IEL-Esperanto Internacia jarkolektoj 1937, 1940, 1941,
 1942, 1943, 1945. Rekompence laŭeble estos sendataj porfilateliaz neuzitaj
 italaj poŝtmarkoj. Serĉataj ankaŭ la noj 1, 2, 6 (1955) kaj 1, 2 (1956) de
 Norda Prismo. Adresu al Prof. Konrado ĈERRI, EK - Casella Postale 159
 - BIELLA (Vercelli, Italujo).

Instruisto deziras korespondi kun katolikaj pastroj pri religiaj temoj.
 S-ro Grigor N. Bogaĝiev, Gazarĝiŝko, *RAKITOVO*, *Bulgarujo*. *



El: *La Nica Literatura Revuo*.

G. Waringhien: Recenzo pri: „La Esperanta
 Antologio” en: 1959, vol. 4, 93-99


N. Z. Maimon: La mistero pri la cenzuristo
 Marko Zamenhof en: 1959, vol. 4, 131-140

K. Kalocsay: La klasika metriko kaj Esperanto
 en: 1959, vol. 4, 164-171; 208-219;
 vol. 5, 5-17; 44; 48-57

N. Z. Maimon: Kiel estis nomata Zamenhof?
 en 1959, vol. 5, 21-28

N. Z. Maimon: Dro Esperanto en: 1959, vol. 5, 65-68

Krucvortenigmo



Horizontale:

- A. parto de libro; grandspaca;
 B. malplena interspaceto inter du frazoj (r); oficiala insigno, konsistanta el longa peco da teksaĵo, portata sur brusto aŭ ĉirkaŭ la talio (r).
 C. submeto al danĝero; ŝiri per la dentoj.
 D. fritilo; insekto el tropikaj landoj (r).
 E. arbedo kun ĉiamverdaj folioj kaj bonodoraj blankaj floretoj (r); naĝbarelo (r).
 F. noktobirdo; parenco.
 G. geologia formacio de la sekundara epoko (r); frukto.
 H. rezultato; ŝteli.
 I. ĝusta rilato inter la diversaj sonoj de instrumentoj (r); sekigi tro malsekan grundon per subteraj tuboj (r).

J. raba besto (r); raba besto; vestaĵo (r).

K. prefikso.

L. enloĝanto de la polusaj regionoj (r); antikva citadelo de Romo (r).

M. ĝenerala nomo de pluraj mineraloj lamencaj, brilaj kaj diafanaj; floro.

N. brusta parto de la korpo (r); realporti (r).

O. ruze aranĝi kombinon por sukcesigi aŭ malsukcesigi aferon (r); rajtiga komisiono, donita al iu, por reprezenti la rajtiganton kaj agi en lia nomo (r).

P. infano (r); parenco (r); objekto.

Vertikale:

I. prilabori lignon aŭ feron por konstrui (r); subinspiri.

II. malsama; knabo, kies gepatroj mortis (r); rediri al demando (r).

III. pecetigi aŭ pulvorigi per ripetitaj batoj (r); armaĵo, ŝirmanta la korpon (r); bileto (r).

IV. kolora fluaĵo uzata por skribi; esti bona por io (r); muzikinstrumento.

V. trinkaĵo; organo, konsistanta el karnaj fibroj kaj servanta por movi la diversajn partojn de la korpo (r); malŝate ridindigi iun aŭ ion.

VI. montra pronomo; en alta grado.

VII. fiŝo (r); poemo; amata (r);

VIII. ĉirkaŭbarita spaco antaŭ konstruaĵo; malsano pro manko de sango (r).

IX. alta temperaturo (r); parto de la mondo, kie troviĝas la polusa stelo; piedmovilo de instrumento (r).

X. flami; hela (r); nacia japana vesto (r).

XI. malgraŭ (r); propravola (r); fortranĉi per tondilo.

XII. kornbesto; sufikso; prepozicio.

XIII. same; manĝebla riverfiŝo.

Li de Jong-Roobeek.



INTER GEEDZOJ.

- Atentu, Johano, ni devas ŝpari la gason.
- Kaj por kio vi volas uzi la ŝparitan gason, karulino?

LA NOVA LOĜEJO.

- Mi aŭdis ke vi nun loĝas en la Turstrato, Maria: je kiu numero?
- Ho, mi denove forgesis; sed ne gravas, ĝi staras super la pordo!

LA SERVEMA ALMOZPETANTO.

- Kial vi metas vian manon en mian poŝon?
- Mi serĉas vian monujon por ke vi donu al mi almozon.

PLI BONA VIVO.

- Do, via bopatrino transiris al pli bona vivo?
- Jes, sinjorino.....kaj mi ankaŭ!

ESPERANTISTA PARENCO SUFIĈAS!

Mi memoras, ke inter la du militoj Patro J. M. Decoene, redemptoristo, en dumkongresaj predikoj aludis sian misiistan restadon en Kanado — Manitoba Ŝtato — kie li kateĥizis, prenis konfesojn, predikis, administris la sakramentojn al paroĥanoj el pli ol 17 malsamaj lingvoj helpe de Esperanto.

Ŝajnas ke sammaniere agis pastro Jubinville en Saint-Félix (Kanado) kaj aliaj misiistoj en Ĥinujo. Sed kredeble nur estas procedo escepta ĉe la misia tasko.

Misiisto, parenco mia, iam skribis kial li ne lernis, resp. instruis Esperanton. Post restado en Ĥinujo, kies lingvon li antaŭe studis, li post la lasta milito subite estis devigita rekomenci per alia lingvo... la japana.

„Mi ja volonte lernus kaj lernigus Esperanton”, li klarigis, „sed tiam daŭrus... jarcenton antaŭ ol ni povus interbabili, kaj krome ne ĉiuj almenaŭ povus uzi sian propran lingvon!”

Tiu vidpunkto, pli elturna ol celtrafa, sendube estas diktita de la peza tasko farenda kaj la penego sin grade alproprigi novan orientan lingvon:

„Pasis preskaŭ kvin jaroj, dum kiuj mi malfacile progresis en la japana, sed ĉion kompreni mi ankoraŭ ne kapablas kaj ofte mi ne scias, kion respondi kaj jam estas kontenta, ke oni ne faris respond-atendan demandon. Ĉar kelkfoje mi kapjesas kun ŝajnkomprena rigardo, sed kiam oni petas mian opinion, mi ja kelkfoje maltrafas la veran sencon, — kaj jen la vico al la alia min rigardi nekomprene... Sed tio ne malhelpas, ke mi ordinare jam kapablas ne aĉeti simion anstataŭ kokido!”

Jam pasis nun denove kvar jaroj kaj nia bonhumora misiisto ekkrias: „por kio ja Esperanto ne taŭgas! Nu, mi estis en la urbdomo de Tokio por plilongigi mian restadpermeson. La oficisto estis... Esperantisto kaj inter miaj paperoj hazarde troviĝis esperanta glumarko, kiun vi iam sendis. Vidinte ĝin — kaj ĝin akirinte — la oficisto rapidege kuris ĉiudirekten por reordigi la permesilon kaj fine mi mem ricevis du japanajn (esperantajn) glumarkojn por sendi al vi...”

„Konkludo: Lernu Esperanton aŭ... klopodu almenaŭ ekhavi iun parencon kiu estas Esperantisto!!”

TYNEVERUM.



RADIO VARSOVIO elsendas ĉiutage de 16.30 - 17.00 M.E.T. duonhoran programon en Esperanto sur mallongaj ondoj: 25,09 - 25,16 - 25,42 - 31,01 - 31,45 - 31,50 - 42,11 m. kaj sur meza ondo 249 m. (resp. 11955 - 11925 - 11800 - 9675 - 9540 - 9525 - 1205 kc/s).

RADIO ROMA Esperanto-Fako, Casella postale 320, Roma (Italujo).

La dissendoj okazas de h. 18.55 ĝis h. 19.10 (M.E.T.).

Ondlongoj: metroj 30.90 = Mc/s. 9.71; 41.24 = Mc/s 7.27; 50.34 = Mc/s 5.96,

Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA;

merkrede: S-ro Luigi MINNAJA; vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA.

OKTOBRO 1960

4. Tra la literaturo; 5. Kuriero de Esperanto; 7. Historia-arta ekspozicio pri la sporto en Romo; 11. Leterkesto kaj bibliografio; 12. Kuriero de Esperanto; 14. Grandaj Sanktuloj: Sankta Teresa el Av.; 18. Italaj kanzonoj en Esperanto; 19. Kuriero de Esperanto; 21. Novajoj el Italujo; 25. Italaj verkistoj: Massimo Bontempelli; 26. Kuriero de Esperanto; 28. Italaj turismaj urboj: Taormina.

*

LA VOĈO DE AMERIKO ELSENDOS ESPERANTO-PROGRAMOJN PRI LA USONAJ ELEKTOJ

Okaze de la nunjaraj usonaj elektoj la Voĉo de Ameriko disaŭdigos serion de tri 30-minutaj radio-programoj en Esperanto je la tri vendredoj antaŭ la elekto-tago, do la 21-an de Oktobro, la 28-an de Oktobro kaj la 4-an de Novembro 1960. Ili konsistos el raportoj pri la elektobatalo, intervjuoj, biografiaj informoj kaj respondoj al demandoj ricevitaĵoj el la tuta mondo. La programoj estos aŭdeblaj sur ses ondlongoj.

Por atingi diversajn partojn de la mondo, ĉiu el la tri programoj estos disaŭdigata *kvarfoje*: je la 11-a (laŭ la horsistemo de Greenwich) sur ondlongo de 41,90 metroj (7160 kilocikloj) — ĉefe por Orienta Azio — je la 12-a sur 19,72 metroj (15210 kcs) — ĉefe por Sudorienta Azio — je la 22-a sur 31,20 metroj (9615 kcs) kaj 25,26 metroj (11875 kcs) — ĉefe por Eŭropo kaj la apudaj regionoj de Azio kaj Afriko — je la 3-a kaj duono sur 19,83 metroj (15130 kcs) kaj 16,92 metroj (17735 kcs) — ĉefe por Suda, Centra kaj Norda Ameriko. La diversaj programoj ankaŭ estos aŭdeblaj en aliaj partoj de la mondo. En ĉi tiu serio du radiosendiloj direktataj al Suda kaj Centra Ameriko estos uzataj unuafoje por Esperanto-programoj de la Voĉo de Ameriko. Ili troviĝas en Okcidenta Usono. La aliaj radio-stacioj uzotaj por la serio troviĝas en Okinaŭa (Rjukju-Insuloj), Manila (Filipinaj Insuloj) kaj Tanger (Maroko). Oni atentu, ke la datoj estas indikataj laŭ la horsistemo de Greenwich. Tio signifas, ke en Eŭropo, Azio kaj Afriko la programoj estos aŭdeblaj en la nokto inter vendredo kaj sabato, en Suda, Centra kaj Norda Ameriko en la nokto inter jaŭdo kaj vendredo.

Raportoj pri la ricevo kaj opiniesprimoj pri la enhavo estu sendataj al D-ro W. Solzbacher, Voice of America, Rm. 2528, HEW, Washington 25, D.C., Usono.